

NOVAĴO DE ANTAŬ DU MIL JAROJ

(artikolo de Alberto Maggi publikigita en la libro

SAMARIAN-LERNANTO, zorge de Meo Bergese – eld. CEM)

Antaŭ dumil jaroj Jesuo ŝanĝis radikale du gravajn konceptojn kiuj estas la fundamentoj de ĉiu religio, tiujn pri la kredanto kaj pri la proksimulo.

En la hebrea religio, kiel cetere en la aliaj religioj, kiel kredanton oni celas tiun kiu obeas sian Dion observante liajn leĝojn, dum la koncepto de proksimulo, en la hebrea religio kaj en la aliaj religioj, enprenas tiun kiu estas objekto de la amo flanke de la kredanto.

Jesuo montriĝas tre kritikema pri tiuj du punktoj kaj ilin ŝanĝas komplete.

Jesuo, la Filo de Dio, venis por inaŭguri malsaman manieron rilati kun iu Dio malsama ol tiu kiu estis ĝis tiam konata.

En la religioj, inkluzivita la hebrea, la homo projekciis sur la diaĵojn siajn timojn kaj siajn dezirojn, siajn frustrigojn kaj siajn aspirojn, pro kio se la homo estis malforta, la Dio devas devige esti pova, eĉ ĉiopova, se la homo estis maljusta, Dio la perfekta justeco, ktp.

Por rilati kun tiu diaĵo, tiom supera al la homoj kiom granda estas la distanco kiu ĝin disigas de ili, ili reproduktis en la religio la rilatojn ekzistantajn inter la homoj kaj iliaj reĝoj, rilaton de servado kaj obo. La servado utilis por akiri la protekton flanke de Dio, la obo al liaj leĝoj garantiis la certecon praktiki la dian volon.

Tion prezentis la religio je la tempo de Jesuo: Moseo, servanto de la Sinjoro, trudis interligon inter la servantoj kaj ilia Sinjoro, bazitan sur la servado kaj sur la obo. Tial kiel "kredanton" oni celis tiun kiu obeis al Dio respektante Liajn leĝojn. Ju pli skrupula estis la respekto de ordonoj kaj preceptoj, normoj kaj preskriboj, des pli la kredanto sciis esti en komuneco kun sia Sinjoro. La obo al la diaj ordonoj implicis krome la oferon de la posedaĵoj de la homo al lia Sinjoro por lin komplezi, por akiri liajn favorojn kaj pardonon.

Pri tio kio koncernas la koncepton de proksimulo, en la epoko de Jesuo estis okazanta vigla debato inter la rabenaj skoloj, pri kiu povus sin difini tiel. Oni iris de la plej rigoraj kaj senkompromisaj pozicioj, por kiuj proksimulo estis nur la apartenanto al propra familia grupo, aŭ maksimume al propra tribo, al tiuj pli elastaj kaj malfermitaj, por kiuj kiel proksimulon oni povis kompreni ankaŭ fremdulon loĝantan sur izraela teritorio.

El la evangelioj evidentiĝas la sufiĉe kritika sinteno de Jesuo pri tiuj konceptoj kiuj estis akceptataj kaj nediskuteblaj.

En la instruado kaj en la praktiko, Jesuo distanciĝas de tio kion la religio trudis kaj la tradicio instruis, ekde la Leĝo de Moseo.

Rilate la ordonojn, Jesuo havas fakte senemocian sintenon, certe konsterna por siaj santempuloj kaj skandala por la reganta pastra kasto.

Jesuo ŝajnas ignori la ordonojn de Moseo.

Lia konduto estas kialo por riproĉo flanke de la skribistoj kaj de la fariseoj, kiuj klopodas kompreni kiu estas la penso de Jesuo rilate la Leĝon de Moseo, formuladon de la eterna interligo inter la Sinjoro kaj Izraelo. Pro tio ili sin adresas al Jesuo demandante al li kiu estas, liaopinie, la ordono taksata plej grava (Mt 22,34-40).

La demando ne estas adresata por ekscii, sed por prijuĝi. Oni scias kiu estas la plej grava ordono, la plej granda: tiu kiun la Sinjoro mem respektas.

Kaj kiu povas esti la ordono kiun Dio mem respektas? La ripozo de la sabato, kiam Dio kaj lia tuta anĝela kortego ĉesigas ĉiun agadon.

Tiu ordono ne estis do egala al la aliaj, sed ĝi resumis la tutan Leĝon. Pro tio la respekto de tiu ununura ordono egalas respekton de la tuta Leĝo. Pro tio la respondo estas konata. Oni volas nur vidi ĉu Jesuo samopinias, ĉar lia sinteno al la ordonoj de Moseo jam vekis pli ol unu suspekto (Mt 15,1-20; 9,8).

La respondo de Jesuo estas perpleksiga.

Oni demandis al li kiu estas la plej grava ordono, kaj li en sia respondo citas neniun ordonon! Fakte Jesuo respondas: "Vi amos la Sinjoron vian Dion per via tuta koro, per via tuta animo kaj per via tuta menso. Tiu estas la ĉefa kaj la unua el la ordonoj. Kaj la dua similas al la unua: Vi amos

vian proksimulon kiel vin mem. De tiuj du ordonoj dependas la tuta Leĝo kaj la Profetoj” (Mt 22, 37-40).

Liaj interparolantoj, sadukeoj kaj fariseoj, restas forlokitaj. Ili lin demandis kiu estu la plej grava ordono, kaj en sia respondo, Jesuo ne nur ne citis la ordonon de la sabato, sed eĉ ne la aliajn naŭ! Kontraŭe li levas al ordono tiujn kiuj estas preceptoj entenataj en la libro de la Readmono (Ra 6,5) kaj en la libro de Levidoj (Lv 19,18.34).

Ankaŭ kiam la juna riĉulo demandis al Jesuo kiujn ordonojn respekti por akiri la eternan vivon, li respondis konsternite. La ordonoj, oni vidis, havis iaspecan hierarkian skalon de valoroj, pro kio tiu de la ripozo de la sabato estis taksata la plej grava. Sed ankaŭ por la aliaj estis diferencoj. La unuaj tri, tiuj kiuj koncernis la devojn al Dio, estis originalaj kaj ekskluzivaj de la Izraela popolo, kaj substrekis ĝian diferencon de la aliaj popoloj. La aliaj sep entenis devojn rilate al la homoj, kiuj estis komunaj en ĉiuj religiaj kodoj kaj civilaj ordosistemoj tiutempaj.

Nu Jesuo, en sia respondo, ne citas la tri rilatantajn la devojn al la Sinjoro, sed nur kvar ordonojn rilatantajn la devojn al la aliaj. (Ne mortigu, ne adultu, ne ŝtelu, ne atestu falsajĝon, respektu la gepatrojn” Mt 19,18), kun aldono de la precepto de la Levidoj rilate la amon al la proksimulo (Lv 19,18).

Konflikto

La penso kaj la konduto de Jesuo estos do ĉiam kialo de kreskanta konflikto kun la religiuloj. Li havos nenian problemon kun impostistoj kaj pekuloj, sed li alfrontos seriozajn riskojn kun la fariseoj kaj skribistoj.

Jesuo vizitadis prostituitinojn kaj senkredulojn sed li estos rigardata kiel malamiko de la ĉefpastroj. La ĝismorte malamikoj de Jesuo estos ĝuste la kredantoj, eĉ tiuj kiuj opinias sin modelo de kredanto pro sia zelota pedanta respekto de religiaj leĝoj, preceptoj, kaj ordonoj.

La konflikto ekas de la fakto ke Jesuo prezentas iun Dion, kies volo ne esprimiĝas per leĝoj, sed per amo. Tio kio gvidas kaj determinas la konduton de Jesuo ne estas la respekto de la Leĝo, sed la amo.

Kaj Jesuo distanciĝas de la dia Leĝo.

Ekde la momento kiam leĝo estas promulgata, ĝi tuj diskriminacias tiun kiu povas ĝin akcepti kaj tiun kiu ne volas aŭ povas ĝin respekti. Estas la leĝo kiu dividas la personojn inter observantajn kaj malobservantajn, purajn kaj malpurajn. Estas la leĝo kiu ekskludas de Dio iujn kategoriojn de personoj.

Jesuo male lasas sin gvidi de la amo, universala amo kiu ne nur volas alveni ĉien, sed volas esti por ĉiuj.

La Leĝo ekskludas tiun kiu ne ĝin respektas, la amo estas proponata al ĉiuj.

La Leĝo baziĝas sur la kategorio de merito, la amo sur tiu de donaco. Por Jesuo, la amo de Dio ne devas esti meritata surbaze de propraj klopodoj, sed akceptata surbaze de propraj necesoj. La amo de Dio ne estas premio, sed donaco.

La imperativo kiu ritmigas la librojn de la Leĝo estis "Estu sanktaj, ĉar mi, la Sinjoro, estas sankta" (Lv 11,44), kaj al sankteco oni aliris per la respekto de la ordonoj kaj de la diaj preceptoj.

La invito kiu karakterizas la instruon de Kristo estis male tute centrita sur la kategorio de la simileco. Jesuo neniam petas obei al Dio, sed esti kiel li, sindona amo kiu komuniĝas al ĉiuj, ankaŭ al tiu kiu ne meritas ĝin, ĉar estas tiel ke la Patro amas, li kiu "estas indulgema kun la sendankuloj kaj la fiuloj" (Lk 6,35). Jesuo invitas esti kiel la Patro, tiu kiu "pluvigas super la justulojn kaj super la maljustulojn" (Mt 5,45).

En sia instruado do Jesuo ne petas obei al Dio, sed simili al la Patro, kaj estas ĝuste tiu la bazo de la ŝanĝo de la koncepto kaj de kredanto kaj de proksimulo. Por Jesuo la kredanto ne estas tiu kiu obeas Dion respektante liajn leĝojn, sed tiu kiu similas la Patron praktikante amon similan al la lia. Dum Moseo, la servanto de la Sinjoro, trudis interligon inter la servantoj kaj ilia Dio, Jesuo, filo de Dio, proponas interligon inter gefiloj kaj ilia Patro. La unua interligo baziĝas sur la obeo, la dua sur la simileco.

En la evangelio de Luko tiu grava ŝanĝo estas bildigita en la parabolo konata kiel tiu de la "Bona Samaritano" (Lk 10,25-37), kie Jesuo prezentas du kontraŭajn sintenojn, tiun de la zelota observanto de la Leĝo, kaj tiun de tiu, kiu, estante ekster la Leĝo, estas konsiderata ankaŭ ekskludita de Dio: la pastro kaj la samaritano.

La parabolo de Jesuo naskiĝas el la demando de iu skribisto, kiu petas al Jesuo esprimiĝi pri la koncepto de proksimulo, por povi tiel ĝuste plenumi la precepton: "Amu vian proksimulon kiel vin mem" (Lk 18,5). En la hebrea spiritualeco estis postulata totala, absoluta amo al Dio ("Vi amos la Sinjoron vian Dion per via tuta koro, per via tuta animo, per via tuta forto kaj per via tuta menso" Lv 19,18), dum tiu al la proksimulo estis relativa (kiel al vi mem). Inter la du amotipoj, tiu al Dio kaj tiu al la proksimulo, estis iu hierarkio de valoroj: la amon al Dio oni ĉiam devis elekti kiel unuan. Jesuo, en la parabolo, montras kion povas provoki la respekton de la leĝo kaj de la amo al Dio komprenataj kiel absolutaj valoroj.

La faktoj de la parabolo estas konataj: homo estas atakita de rabistoj en iu loko, la strato kiu iras de Jerusalemo (818 mt. super la marnivelo), al Jeriko, kiu troviĝas je 258 mt. sub la marnivelo.

Tiu strato trairas senakvajn kaj dezertajn lokojn, kaj ĝi estas malfacile trairebla kaj danĝera pro la malbonaj renkontiĝoj kiuj povas okazi, kiel fakte okazis al iu malbonŝanculo kiu estas atakata, priŝtelita kaj forlasita duonmortonta.

La morto estas certa.

Krom se... krom se trairus iu bonulo kiu lin prizorgos. Kaj Jesuo, tre lerte, ĝin prezentas tiun sanktan animon kiu povas savi la mortonton: laŭ la sama vojo estas malsupriniranta pastro: plej bone ol tio ne povintus okazi.

Jeriko estas pastra urbo kaj de tie, laŭ siaj alternadoj, la pastroj supreniris al la templo de Jerusalemo por plenumi sian servadon. La fakto ke tiu pastro estas malsupreniranta, signifas ke li plenumis sian semajnon de servado en la sanktejo, kaj ke li estas en kondiĉoj de ekstrema sankteco kaj pureco... plej bono ne povintus okazi. Kaj Jesuo pliigas la streĉitecon en la aŭskultantoj, dirante ke la pastro rimarkas la mortonton, lin vidas, sed.. "pluiris al la alia flanko" (Lk 10.31).

Kial? Ĉu li estas senkora homo? Ĉu indiferenta al la homaj suferoj?

Pli malbone: li estas religiulo. Kaj lia religio devigas lin, pastron en kondiĉo de laŭleĝa pureco, ne alproksimiĝi al vundito, ĉar eĉ ununura sangoguto povas lin igi malpura (Lv 21,1). Cetere oni instruis al li ke, kiam estos la momento, li ne povos eĉ lastfoje karesi la kadavrojn de siaj gepatroj, ĉar aliel li surpronus ties malpurecon (Lv 21,11).

La pastro ne sentas sin koncernata de la dramo de la mortonto. Por la religiuloj estas memevidente ke la respekto de la dia Leĝo antaŭas la helpon al proksimulo. En kazo de konflikto inter la bono de Dio kaj la bono de la homo, la religiuloj scias ĉiam kion elekti. Ĉu ilia leĝo ne instruas ke la amo al Dio estas pli grava ol tiu al la proksimulo?

Ne por Jesuo.

Jesuo, ĉiun fojon kiam li troviĝos en konflikto inter la respekto de la dia leĝo kaj la homa bono, neniel hezitos: farante la bonon de homo oni estas certaj fari ankaŭ tiun de Dio. Tro ofte por honoro Dion oni suferigas la personojn.

Ĉiu espero estas perdita por la homo atakita de la rabistoj. Ankaŭ tiu, mortnaskita, de la ekapero de Levido, tio estas de tiu ŝarĝito pri kulto kaj ritoj de la templo de Jerusalemo. Ankaŭ li en kondiĉoj de pureco, ankaŭ li observanta, ankaŭ li lin vidas kaj iras plue.

Por igi la bildon definitive drama, jen aperas, post du sanktaj personoj kiuj povintus esti la savantoj, la misaŭgura silueto de iu Samariano, la individuo plej fia kaj plej for de Dio, kiu povus ekzisti. La malamo inter Judoj kaj Samarianoj estis proverba, kaj la Judoj tre zorge evitis pasi tra Samario, regiono danĝera pro ĝiaj batalemaj enloĝantoj.

Tio estas la fino por la kompatindulo.

Nun sen ajna dubo la Samariano, kiu lin vidis, alproksimiĝos kaj donos al li la mortobaton, tiel eliminante malamikon, kaj verŝajne prenante tion kion la rabistoj povintus lasi al li.

En la kulmina punkto de la parabolo, Jesuo ludas sian plej bonan karton, kiu skuegas la aŭdantaron.

Por kompreni la gravecon kaj la novaĵon de la aserto kiun Jesuo eldiros, necesas scii ke en la hebrea mondo oni distingis inter kompati kaj indulgi. La unua, la kompato estis sinteno ekskluziva de Dio, per kiu la Sinjoro redonis vivon al tiu kiu ĝin ne havis, kaj en la Biblio ĝi estas ĉiam utiligata por indiki la dian agadon. La dua, la indulgo, estis male homa sento.

Nu, jen la teatrofrapo: asertas Jesuo ke la Samariano "ĝin vidinte sentis kompaton... kaj lin prizorgis" (Lk 10.31).

Homo, kaj des pli konsiderata la plej malproksima de Dio, havas la saman konduton de la Sinjoro, la kompaton.

Nekredeble!

Kiu, inter la du personuloj, la pastro kaj la samariano, estas la kredanto?

Por Jesuo la kredanto ne estas tiu kiu obeas al Dio, sed tiu kiu similas al Patro, manifestante amon similan al la lia.

La kredon en la Sinjoro oni ne rekonas per tio kiun iu kredas, sed per kiel li amas. Pro tio Jesuo, en sia instruo, deklaras ke la Sinjoro ne postulos konton de la homoj pri kiomfoje ili supreniris al la templo por preĝi, sed pri kiomfoje ili malfermis propran hejmon al fremdulo. La Sinjoro ne petos kiom oni oferis al li, sed kiom estis donacita al bezonhavanto (Mt 25,31-46).

La leĝdoktoro demandis al Jesuo kiu estis lia proksimulo, tio estas ĝis kioma punkto devis alveni lia amo.

Jesuo, surprize, renversas al li la demandon, kaj post la ilustrado de la parabolo, li demandas al la leĝdoktoro: "Laŭ vi kiu inter tiuj tri ŝajnas esti estinta la proksimulo de tiu kiu renkontis la rabistojn?" (Lk 10,36).

La skribisto estas forlokita... kaj per sia balbutanta respondo ne povas agnoski, li, defendanto de la Leĝo kaj de la tradicio, ke homo povas esti havinta la saman senton de Dio, la kompaton, kaj li respondas: "Tiu kiu estis kun li indulgema" (Lk 10,37). Sed la samariano, diris Jesuo, ne estis indulgema (homa agado), sed li estis kompatema (dia agado).

Por Jesuo la proksimulo ne estas tiu kiu estas amata, sed tiu kiu amas.

Esti proksimulo ne dependas de tiu kiu estas bezonhava, sed de tiu kiu alproksimiĝas al li por lin helpi. La leĝdoktoro volis scii ĝis kioma punkto devus alveni lia amo. Jesuo instruas al li de kie tiu amo devas eki.

Jen do kunigitaj la du gravaj konceptoj de la kredo, tiu de kredanto kaj tiu de proksimulo: la kredanto estas tiu kiu similas la Patron praktikante amon similan al la lia, kaj tiu amo puŝas lin iĝi proksimulo de kiu ajn troviĝas en malfacilaj kondiĉoj.